

## **ILEI**

### **La Ligo vivas kaj progresas**

Jen prezento de la ĉefaj faktoj de nia 51-a Kongreso en Madrido.

Aliĝis 256 personoj. Tio estas rekordo por la ĉiujara grava evento de la Ligo.

La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn. Temas pri Profesoro Ronald Glossop kaj Profesoro Duncan Charters, ambaŭ el Usono.

La Komitato akceptis du novajn sekciojn : unu en Senegalo, unu en Armenio. Per tiu paŝo ILEI nun havas 43 sekciojn.

La Komitato dankis Profesorinon GONG Xiaofeng « Arko », kiu deĵoris kiel vic-prezidanto en la Estraro dum 6 jaroj. Ĉar estas finiĝo de la oficperiodo, do Arko forlasis sian postenon kaj ne plu kandidatiĝis por reelektiĝo. La Komitato reelektis la kvin kandidatiĝantajn membrojn kaj alelektis du novajn personojn. Konsekvence la Estraro konsistas ekde nun por tri jaroj el (laŭ alfabeto ordo)

Karine Arakeljan, Armenio, nova estraranino.

Ivan Colling, Brazilo

Mireille Grosjean, Svislando, prezidanto

William Harris, Usono, kasisto.

Elena Nadikova, Rusio, sekretario

Radojica Petrovic, Serbio

Yuro JUNG « Unika », Koreio-Japanio, nova estraranino.

La taskodivido inter la estraranoj ne ankoraŭ okazis. Oni povas rimarki, ke la Estraro konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj. Okaze de la tuta Kongreso kaj dum la konkluda parto la partoprenantoj povis esprimi sin, proponi novajn ideojn, diri dezirojn. La estraro multon notis kaj pritaksos tiujn sugestojn. Substrekindas, ke diversaj personoj ne nur proponis ion, sed ankaŭ proponis mem transpreni la taskon. Do la pozitiva etoso en la Ligo altiras kunlaboremulojn.

La Komitato aprobis ĉiujn raportojn kaj malŝarĝis la Estraron.

La Kongreso komenciĝis per du komunaj tagoj kun la tuthispana Kongreso de la Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi finiĝis per simpozio pri la kongresa temo : la kultura heredaĵo de Esperanto. Partoprenis en tiu simpozio diversaj esperantistaj profesoroj kaj unu profesorino de la Universitato por ne ĉeesta instruado UNED. Kompreneble la urbo Madrido, grava eŭropa ĉefurbo, altiris multajn partoprenantojn el entute 33 landoj, kiuj volis malkovri la kulturajn trezorojn de tiu urbego. Parkoj, muzeoj, preĝejoj, monumentoj ne mankas en Madrido. Ne eblas menciigi ĉiujn restoraciojn, kie la kongresanoj povis malkovri la hispanan gastronomion.

Inter la programeroj de tiu Kongreso oni povas menciigi la frandvesperon, kiu okazis ekstere kun koncerto de la grupo Kaj Tiel Plu ; Lingvan Festivalon, AMO-seminaron, diversajn lingvokursojn, lertigadon de instruistoj EIT sub la gvidado de D-ino Katalin Kovats, koncertojn de Kajto, naciĝan vesperon, internaciĝan vesperon, dudekon da diversaj prelegoj kaj multajn interesajn ekskursojn.

Raportas Mireille Grosjean

